

## La 30an de junio 2016

### Priploraj Manifestacio kaj Ceremonio en Okinavo

Hodiaŭ mi ĵus finlegis la novelon “Paradizo Ŝtelita” verkita de aŭstralia verkisto Trevor Steele temantan pri la sorto de aborigenoj en la insulo Tasmanio. La verko estas tre interesa kaj mi volis kompreni la enhavon pli profunde kaj ĝuste, do mi relegis ĝin kaj hodiaŭ mi finlegis ĝin duan fojon. Dume en mia kapo aperis Okinavo. Ankaŭ tiu suda insulo estas “Paradizo Ŝtelita”.

Okinavo, la reĝlando Rjuukjuu, estis sendependa ĝis 1609, kiam la Feŭdo de Sacuma (nuna gubernio Kagoŝima) invadis kaj koloniis ĝin. En 1879 la japana registaro igis Okinavon unu el la japanaj gubernioj. En la insularo troviĝis originalaj kulturoj kaj lingvoj, sed tiuj estis subpremataj kaj asimilitaj al Japanio.

En marto 1945 venis al la insularo milito. La 26an de marto la usonaj soldatoj surteriĝis en la insulon Kerama kaj la 1an de aprilo en la okcidentan marbordon de la insulo Okinavo. La 23an de junio la japana komandanto mortigis sin kaj finis la batalon oficiale, sed en multaj lokoj bataloj daŭris ĝis septembro. Dume mortis 94136 japanaj soldatoj, 12520 usonaj soldatoj kaj 94000 loĝantoj. Oni diras, ke kvarono de tiutempaj loĝantoj mortis, envolvite de la bataloj. En multaj japanaj urboj loĝantoj

suferis pro usonaj aeratakoj, sed nur en Okinavo okazis surteraj bataloj.

Poste komenciĝis usona regado ĝis 1972. Dume la loĝantoj devis uzi usonajn dolarojn kaj kiam ili volis vojaĝi al Japanio, ili bezonis japanan vizon. Fine Okinavo sukcesis unuiĝi al Japanio, sed daŭre usonaj militbazoj restas same kiel dum la koloniita periodo, kaj arogantaj soldatoj suferigas la loĝantojn per kruelaj krimoj.

Se Okinavo ne estintus koloniita de Sacuma, de Japanio kaj de Usono kaj ne estus subpremata de la nuna Japanio kaj la usona armeo, ĝi estus paradizo. Vere ankaŭ Okinavo estas ŝtelita paradizo.

### **65000 homoj manifestaciis la 19an de junio**

Larmoj kaj koleloj plenigis “la Manifestacion por priplori la junulion mortigitan de la eksa usona soldato de la infanterio” okazinta en la urbo Naha, la ĉefurbo de Okinavo. En ĝi kolektiĝis 65000 homoj. La rezolucio adoptita en la manifestacio resume tekstas jene:

Dum 71 jaroj post la fino de la dua mondmilito la usona armeo garnizonadas en Okinavo, sekve nur post la redono de Okinavo al Japanio en 1972 okazis 5910 krimoj inkluzive de 575 kruelaj krimoj. Por protekti vivon kaj homajn rajtojn de la okinavanoj, estas urĝe,



ke la usonaj militbazoj estu reduktitaj, kaj plej urĝe estas reiro de la infantario al Usono.

Unuan fojon en la guberninivelaj manifestacioj oni deklaris reiron de la infantario al Usono. Tio signifas, ke la kolero de la okinavanoj jam trapassis la limon de toleremo. En tiu manifestacio la reganta partio Liberala Demokratia Partio kaj ĝia koalicia partio Koomei ne partoprenis. Ili rifuzis adopti la rezolucion, kiu postulas reiron de la usona infantario al Usono.



Sur la ŝildoj estas skribitaj “Kolero transpasis la limon”.
---

En la manifestacio f-ino Tamaŝiro Ai, 21-jara, alvokis jene:

Vi, kiu suferis tragedian, neniam forgesu, ke ĉiuj okinavanoj, pensante pri via sorto, ploras, koleras, malĝojas kaj sentas neesprimeblan doloron. Vi neniam forgesu tion.

Se mi, nekonato al vi, parolos publike, ĉu mi ne vundos vin kaj viajn karajn homojn? Ĉiun tagon mi estis obsedata de tiu timo, sed mi ne volas esti silenta, do mi decidis stari ĉi tie. Pardonu min. Vi, viaj familianoj kaj viaj karaj homoj havu eternan pacon kaj konsolon. Ankaŭ mi preĝados.

Estimata s-ro ĉefministro ABE Ŝinzoo kaj ĉiuj japanaj loĝantoj ekster Okinavo, vi estas duaj atencintoj. Vi serioze alfrontu al la sufero de Okinavo. Ĝis kiam ni, okinavanoj, estos mokridataj? Ĉu ni povos vivi sekure, se multiĝos patroloj kaj se ni lernos defendarton? Vere absurdaĵoj!

Esenco de la armeo ekzistas en masakrado. Ŝablonaj kaj infanecaj proponoj pri prevento de denovaj krimoj kaj pli da discipligo de soldatoj estas sensencaj. Tiuj estas nur mizera provo pretervidigi al la publiko la esencon de la armeo.

Estimata usona prezidento Barak Obama, liberigu Japanion de Usono. Se ne, ekzistas nek libereco, nek demokratio en Okinavo. Ni ne estas sklavo. Ni estas homoj same kiel usonanoj. S-ro Obama kaj ĉiuj usonanoj, honeste alfrontu al la viktimoj kaj la okinavanoj, kaj petu de ili pardonon.

Vi rajtas fieri pri via lando, sed ĉu vi scias, ke via lando estas nomata lando de mortigistoj, kiuj ne komprenas valoron de vivo. Mi rekomendas, ke Usono kaj la usonanoj mem demandu sin, kio estas la esenco de la armeo kaj militoj.

Karaj partoprenantoj de tiu ĉi manifestacio! Kio estas vivi feliĉe? Kian formon havas la socio, en kiu ĉiuj homoj estas respektataj? Mi estas fiera, ke mi estas okinavanoj, komune posedantaj la ideon, ke la homa vivo estas trezoro.

En kia Okinavo mi volas vivi? Kial mi pensas pri la signifo de mia vivo? Ĉiun tagon mi vivas, tenante pezaĵon en mia koro.

Mia feliĉo estas feliĉo de ĉiuj okinavanoj, kaj feliĉo de ĉiuj okinavanoj estas mia feliĉo. Tio estas la socio de Okinavo. Mi nun vivas kun miaj familianoj kaj amikoj, kiuj amas min, sed mi tute ne estas feliĉa.

Tiu junulino en mia generacio estis mortigita. Anstataŭ ŝi, mi povintus esti mortigita, aŭ miaj amikinoj povintus estis mortigitaj. La socio, kiun mi fidis, trompis min. La sento, ke io nekonata provas subpremi min, estas neniam forgesebla.

Digno de vivo kaj tempo de vivo estas neitaj de la armeo. Mortigo estas pravigita. Kiu faris tiun absurdan socion? Mi vivas, tiamaniere demandante min, kaj ju pli profunde mi konsideras, des pli forte, tagon post tago, mi eksentas, ke mi estas respondeca, mi estas koncernata.

Ni ĉiuj vivu kiel okinavanoj, kiel civitanoj, kun fiero kaj respondeco, kompensante ŝian perditan tempon. Ni neniam ripetigu tian tragedion! Ni laŭte adresu al la mondo la spiriton de Okinavo, ke la tempo de homa vivo kaj vivo mem havas fierindan kaj profundan valoron.

## **Priplora Ceremonio pri la batalo en Okinavo**

La 23an de junio en la monteto Mabuni en la urbo Itoman okazis Priplora Ceremonio por la viktimoj en la batalo de Okinavo. En ĝi knabino Nakama Risa, 11-jara lernantino en la urbo Kin, voĉlegis la sian “Poemo por paco” elektita el la 848 poemoj.

### **Poemo por paco**

Nakama Risa

“Miin, miin ....”

Venis sezono de mincikadoj.

Mi aŭdis, ke la voĉoj de mincikadoj esprimas malĝojon el la spirito de militpereintoj.

Ĉu la spiritoj de forpasintoj loĝas en tiuj cikadoj?

“Miin, miin ....”

Ankaŭ en tiu ĉi jaro ili kantadas.



“Avo, kio okazis al vi?”

Mi demandas Avon,  
kiu palpas sian maldekstran brakon.  
Mi sekvas lian rigardon.  
En televido aperas bildoj de milito.  
Post iom da silento li balbutante malfermis sian buŝon:  
“Mi estis en la mararmeo”.  
Vidante min surprizita,  
“Kuglo el la ĉielo trafis mian maldekstran brakon”,  
li diris kvazaŭ monologe.  
Mi klare memoras lian figuron.  
Kiam li rememoras la militon, lia brako komencas dolori.  
Akre kaj tranĉe.  
En la koro de Avo  
ĉu ankoraŭ daŭras la milito?

Avo jam forpasis.  
Ĉu li aŭdas la kantojn de tiuj cikadoj  
for en la ĉielo?  
Ĉu li akceptas la kantojn kiel spiriton de la mortintoj?  
Mi opinias, ke cikadoj ne kantas malĝojon de la mortintoj.  
Ili kantas esperon por paco.  
Ili flugas en la grandan ĉielon,  
kaj montras al ni la valoron kaj belecon de paco.

Ni, etendante niajn manojn al la ĉielo,  
kriu pacon kun espero kune kun la cikadoj,  
“Miin, miin ....”  
*“Fuiiŭa nu ŝikee du Teeŝiĉi!”\**  
“Paca mondo estas valora!”

\*En la okinava dialekto “Paca mondo estas valora!”

Ne nur en Okinavo, sed ankaŭ en mia gubernio ni foje sentas maltrankvilon pro la usonaj aviadiloj. Kiam la aviadilŝipo George Washington revenas al la haveno Jokosuka en la gubernio Kanagaŭa apud Tokio, komenciĝas ekzercoj de ĉasaviadiloj. Ili flugas ĝis vespere supre de mia urbo kun bruoj. Tiuj bruoj ne tiel fortaj, sed senĉesaj, kaj ni sentas grandan malagrablon. Ni ankaŭ timas, ke ili falos aŭ ili erare farigos bombon.

En multaj lokoj troviĝas usonaj militbazoj en Japanio, krome la japana defendkorpuso pli kaj pli fariĝas arma, plialtigante kapablon batali. Esenco de armeo ekzistas en masakrado. La nuna sufero de Okinavo estas ankaŭ nia sufero.

被害に遭われた女性へ。絶対に忘れないでください。あなたのことを思い、多くの県民が涙し、怒り、悲しみ、言葉にならない重くのしかかるものを抱えていることを絶対に忘れないでください。

あなたと面識のない私が発言することによって、あなたやあなたがこれまで大切にされてきた人々を傷つけていないかと日々葛藤しながら、しかし黙りたい。そういう思いを持っています。どうぞお許してください。あなたとあなたのご家族、あなたの大切な人々に平安と慰めが永遠にありますように、私も祈り続けます。

安倍晋三さん。日本本土にお住まいのみなさん。今回の事件の「第二の加害者」は、あなたたちです。しっかり、沖縄に向き合っていただけませんか。いつまで私たち沖縄県民は、ばかにされるのでしょうか。パトカーを増やして護身術を学ばば、私たちの命は安全になるのか。ばかにしないでください。

軍隊の本質は人間の命を奪うことだと、大学で学びました。再発防止や綱紀粛正などという使い古された幼稚で安易な提案は意味を持たず、軍隊の本質から目をそらす貧相なもので、何の意味もありません。

バラク・オバマさん。アメリカから日本を解放してください。そうでなければ、沖縄に自由とか民主主義が存在しないのです。私たちは奴隷ではない。あなたや米国市民と同じ人間です。オバマさん、米国に住む市民のみなさん、被害者とウチナーンチュ（沖縄の人）に真剣に向き合い、謝ってください。

自分の国が一番と誇るということは結構なのですが、人間の命の価値が分からない国、人殺しの国と言われていることを、ご存じですか。軍隊や戦争に対する本質的な部分を、アメリカが自らアメリカに住む市民の一人として問い直すべきだと、私は思います。

会場にお集まりのみなさん。幸せに生きるって何なのでしょうか。一人一人が大切にされる社会とは、どんな形をしているのでしょうか。大切な人が隣にいる幸せ、人間の命こそ宝なのだという沖縄の精神、私はウチナーンチュであることに誇りを持っています。



私自身は、どんな沖縄で生きていきたいのか、私が守るべき、私が生きる意味を考えるとということは何なのか、日々重くのしかかるものを抱えながら現在生きています。

私の幸せな生活は、県民一人一人の幸せにつながる、県民みんなの幸せが私の幸せである沖縄の社会。私は、家族や私のことを大切にしてくれる方たちと一緒に今生きてはいるのですが、全く幸せではありません。

同じ世代の女性の命が奪われる。もしかしたら、私だったかもしれない。私の友人だったかもしれない。信頼している社会に裏切られる。何かわからないものが私をつぶそうとしている感覚は、絶対に忘れません。

生きる尊厳と生きる時間が、軍隊によって否定される。命を奪うことが正当化される。こんなばかばかしい社会を、誰が作ったの。このような問いをもって日々を過ごし、深く考えれば考えるほど、私に責任がある、私が当事者だという思いが、日に日に増していきます。彼女が奪われた生きる時間の分、私たちはウチナーンチュとして、一人の市民として、誇り高く責任を持って生きていきませんか。もう絶対に繰り返さない。沖縄から人間の生きる時間、人間の生きる時間の価値、命には深く誇るべき価値があるのだという沖縄の精神を、声高々と上げていきましょう。

平和（ふいーわ）ぬ世界（しけー）どう大切（てーしち）

金武町立金武小学校6年 仲間里咲（りさ）

---

- **特集：沖縄はいま**
  - **「平和の世界が大切」小6が詩を朗読 沖縄慰霊の日**
- 

「ミンミン」  
今年も蝉（せみ）の鳴く季節が来た  
夏の蝉の鳴き声は  
戦没者たちの魂のように  
悲しみを訴えているということを

耳にしたような気がする  
戦争で帰らぬ人となった人の魂が  
蝉にやどりついているのだろうか  
「ミーンミーン」  
今年も鳴き続けることだろう  
「おじいどうしたの？」  
左うでをおさえる祖父に問う  
祖父の視線を追う私  
テレビでは、戦争の映像が流れている  
しばらくの沈黙のあと  
祖父が重たい口を開いた  
「おじいは海軍にいたんだよ」  
おどろく私をよそに  
「空からの弾が左うでに当たってしまったんだよ」  
ひとりごとのようにつぶやく祖父の姿を  
今でも覚えている  
戦争のことを思い出すと痛むらしい  
ズキンズキンと・・・  
祖父の心の中では  
戦争がまだ続いているのか  
今は亡き祖父  
この蝉の鳴き声を  
空のかなたで聞いているのか  
死者の魂のように思っているのだろうか  
しかし私は思う  
戦没者の悲しみを鳴き叫ぶ蝉の声ではないと  
平和（ふいーわ）を願い鳴き続けている蝉の声だと  
大きな空に向かって飛び  
平和（ふいーわ）の素晴らしさ尊さを  
私達に知らせているのだと  
人は空に手をのぼし  
希望を込めて平和（ふいーわ）の願いを蝉とともに叫ぼう  
「ミーンミーン」  
「平和（ふいーわ）ぬ世界（しけー）どう大切（てーしち）」